

La Merkato

ISSN 0941-9306

Aprobo de jarraporto kaj elekto de estraranoj

Laŭ la IKEF-statuto dum la universala kongreso okazu la ĝenerala kunveno de IKEF. Ĉar dum la ĉi-jara universala kongreso ne okazas ĝenerala kunveno, sed nur informkunveno, estos speciala proceduro por la aprobo de la jarraporto kaj por la (re)elekto de estraranoj. Legu la detalojn je p. 3.

Kunveno de ĉinaj E-komercistoj kaj IKEF-anoj en septembro 2007

Kunsido de IKEF-Ĉinio okazos de la 16a ĝis la 18a de septembro 2007 en Rizho, havena urbo ĉe la Flava Maro. La kunsido estos fermita al ĉinaj nekomercistaj esperantistoj. La kunsidon partoprenos ĉirkaŭ 20 ĉinaj E-komercistoj inkluzive IKEF-membroj. Eksterlandaj E-komercistoj estas bonvenaj.

La ĉina peranto de IKEF
[chielismo\(a\)yahoo.com.cn](mailto:chielismo@yahoo.com.cn) [komerco\(a\)public.xa.sn.cn](mailto:komerco(a)public.xa.sn.cn)

Enhavo

Aprobo de jarraporto - Elektro de estraranoj	3
Raporto pri la agado de IKEF dum 2006	4-5, 8-9
Novaj membroj	6
Komercaj petoj kaj proponoj	10-12
Fervojfakaj terminoj (daŭrigo)	13-15

La Merkato (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare [duonjare ekde 2006] ([jan]-apr-[jul]-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland ROTSAERT. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

Estraro de IKEF: Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario: vakas; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; D-ro Achim HORNECKER; S-ro Silvio KNISS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. Ooba Atsua; S-ro WANG Tianyi. **Revizoro por la financa raporto:** D-ro Gianfranco POLERANI.

Financa sidejo kaj membrara administrado: Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge, Belgio, tel/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: [roland.rotsaert\(at\)telenet.be](mailto:roland.rotsaert(at)telenet.be).

La jara **membrokoto** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). [Tarifoj provizore duonigitaj ekde fino de 2005.] Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoŝeĉejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokoto (laŭ plena tarifo). Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

Kontoj: - ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c* - www.moneybookers.com (konto=retadreso de kasisto) - belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

Perantoj

Internacie: Flandra E-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto [financoj\(a\)fel.esperanto.be](mailto:financoj(a)fel.esperanto.be))

Brazilo: Silvio KNISS MATES ([silvio\(a\)davincibrasil.com.br](mailto:silvio(a)davincibrasil.com.br); Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

Ĉinio: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto [komerco\(a\)public.xa.sn.cn](mailto:komerco(a)public.xa.sn.cn)

Francio: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto [efikso\(a\)wanadoo.fr](mailto:efikso(a)wanadoo.fr)

Germanio: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto [f.j.braun\(at\)-online.de](mailto:f.j.braun(at)-online.de)

Hungario: D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, [istvan.gether\(a\)office.ksh.hu](mailto:istvan.gether(a)office.ksh.hu)

Italio: D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto [g.polerani\(a\)tiscalinet.it](mailto:g.polerani(a)tiscalinet.it) (poŝta konto 37485208)

Japanio: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto [syama\(a\)qf6.so-net.ne.jp](mailto:syama(a)qf6.so-net.ne.jp) (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

Kroatio: S-ro Vjekoslav MORANKIĆ, Lipa 40 E, HR-51000 RIJEKA, retpoŝto [esperanto.rijeka\(a\)ri.htnet.hr](mailto:esperanto.rijeka(a)ri.htnet.hr).

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org, www.ikef.info aŭ www.ikef.net

Proceduro por aprobo de la jarraporto kaj por la elekto de estraranoj

Jarraporto

Sur la sekvaj paĝoj aperas la raporto pri la agado de IKEF dum la pasinta jaro. Je la 17a de februaro 2007 la revizoro, d-ro Polerani, skribis:

Post ekzameno de ĉiuj dokumentoj, mi informas vin ke mi trovis ĉion en ordo kaj ke, pro tio, vi povas submeti la rezulton de la jaro 2006 al la aprobo de IKEF-anoj dum la venonta UK okazonta en Jokohamo.

Tamen, ĝis nun nur unu estrarano anoncis ke li ĉeestos la UK. Antaŭvideblas ke ankaŭ estos malmultaj IKEF-membroj. Tial dum la UK ne okazos ĝenerala kunveno de IKEF. Konforme al artikolo 7.4 de la IKEF-statuto, 'la aprobo de la raporto sekvas aŭtomate du monatojn post publikigo, krom se pli ol duono de la membroj skribe al la Ĝenerala Sekretario indikas malaprobon'.

Praktike, la limdato de du monatoj por indiki malaprobon estas la 15a de junio 2007. S-ro F.J. Braun escepte rolos kiel Ĝenerala Sekretario.

Elekto de estraranoj

Laŭ artikolo 8 de la statuto, 'Elekto de membroj de la Estraro okazas per skriba voĉdonado perpoŝta, se ne eblas en la koncerna jaro okazigi Ĝeneralan Kunvenon'.

En la nuna jaro, estraranoj Hornecker, Kniess Mates, Ooba kaj Rotsaert atingas la finon de sia dujara oficperiodo. Ili ĉiuj rekandidatiĝas. Pliaj kandidatoj anoncu sin plej laste je la 30a de aprilo 2007 ĉe s-roj R. Rotsaert ([ikef\(a\)telenet.be](mailto:ikef(a)telenet.be)) kaj F.J. Braun ([f.j.braun\(a\)t-online.de](mailto:f.j.braun(a)t-online.de)). Kelkajn tagojn poste la nomoj de ĉiuj kandidatoj aperos en la rubriko 'aktuale' de www.ikef.org.

Ekde tiam, ĝis la 15 de junio 2007, skriba (aŭ retpoŝta) voĉdono estus sendata al s-ro F.J. Braun ([f.j.braun\(a\)t-online.de](mailto:f.j.braun(a)t-online.de), Hornisgrindestr. 8, DE-77815 Bühl, Germanio). La rezulto aperos samloke kelkajn tagojn poste.

IKEF-aranĝoj dum la Universala Kongreso en Jokohamo

Ankoraŭ ne estas konataj detaloj pri la IKEF-aranĝoj dum la UK. Bonvolu rigardi la rubrikon 'aktuale' de www.ikef.org dum la semajnoj antaŭ la UK.

Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 2006

Ĝenerale

La plej menciindaj agoj de IKEF dum la pasinta jaro estis la ĝenerala kunveno je la 1a de aŭgusto kaj la vizito al la Komerca de Florenco (preparita de nia revizoro, d-ro Polerani) je la 3a de aŭgusto 2006, ambaŭ en la kadro de la 91a Universala Kongreso de Esperanto en Florenco.

Krome, en Ĉinio okazis:

1. kunsido de IKEF-anoj kaj E-komercistoj kadre de Liuyanghe E-kongreso;
2. kunsido de E-komercistoj kadre de Wuyishan E-kunveno dum aŭgusto;
3. renkontiĝo de E-komercistoj kadre de Ĉina Foiro en Kantono dum oktobro.

La IKEF-estraro, daŭre sen prezidanto kaj sen sekretario, konsistas el s-ro Roland ROTSAERT, Belgio, Financa Konsilanto (kaj redaktoro de La Merkato); d-ro Achim HORNECKER, Germanio; s-ro Silvio KNISS MATES, Brazilo; d-ro Rainer KURZ, Germanio; prof. Atsuo Ooba, Japanio; s-ro WANG Tianyi, Ĉinio. Dum la ĝenerala kunveno estranoj KURZ kaj WANG estis reelektitaj por periodo de 2 jaroj.

La membronombro, kiu en iu momento nur iomete superis 100, denove kreskis al 114, precipe dank'al ĉinaj aliĝoj. Ankaŭ aldoniĝis unu dumviva membro el Ĉinio.

La Merkato dum 2006 nur aperis dufoje. Kelkaj pliaj membroj petis ricevi la revuon rete (kiel .pdf-dosieron) aŭ ricevi informon kiam nova numero legeblas je la IKEF-retpaĝoj.

Meze de 2006 estis lanĉita la unua provversio de reta membroadministrado; komence de 2007 aperis plibonigita versio, per kiu membroj efektive kapablas registri siajn proprajn informojn.

Kiel pasintjare, ne estis iniciatoj rilate al terminologia laboro aŭ eldonoj kaj alvoko por varbi komercajn reklamojn por la revuo Monato ne liveris rezulton.

Financoj

La spezokonto kaj bilanco aperas sur la mezaj paĝoj de ĉiu tiu revuo. Kompense por la duonigo de la aperritmo de La Merkato - nun preskaŭ la sola servo de IKEF

- ankaŭ la kotizpagoj estis duonigitaj. Tamen, la sumo de la ricevitaj kotizoj restas kontentiga. Ankaŭ la sumo de la antaŭpagitaj kotizoj kaj la kapitalo de la dumvivaj membroj montras ke restas fido je la estonto de IKEF.

La ĉefa elspezo estas la eldono de La Merkato. Ĝia kosto malkreskis, sed tamen ne duoniĝis, ĉar la du numeroj havis pli grandan paĝonombron. La nura alia grava elspezo estas la membreco de UEA, kiu konsistigas preskaŭ la tuton de la 'ĝeneralaj kostoj'. Ĝi donas i.a. rajton al senpaga salono dum la UK.

La rezulto de la en- kaj elspezoj estas modesta profito de 79,38 eŭroj, aldonotaj al la kapitalo. La kvanto de la disponeblaj monrimedoj restas je la sama nivelo kiel dum la pasintaj jaroj.

Laŭ propono de la ĉina peranto, IKEF malfermis konton ĉe 'Moneybookers'. Estas internacia reta pagsistemo, kiu por malgrandaj sumoj estas pli taŭga ol banka ĝiro. Ĝi jam estis kelkfoje kun sukceso uzita. Ĝia 'kontonumero' estas la retadreso de la kasisto: roland.rotsaert@telenet.be.

Majo 2007: Internacia renkontiĝo de esperantistoj-komercistoj en Bulgario?

En la komenco de la monato majo de la jaro 2007 mi planas internacian renkontiĝon de komercistoj esperantistaj kaj neesperantistaj, malgrandaj kaj mezgrandaj, el Bulgario kaj el aliaj landoj.

Mi petas geesperantistojn el aliaj landoj faru ion! Petu viajn geamikojn kaj gekonatojn, ĉu ili volas partopreni aranĝon. El bulgara lando ni havas subtenon teorie kaj per kontaktoj. Se ni trovus monsubtenantojn, eblus partopreni ĉion senpage. Tio estas nia deziro kaj por tio ni laboras.

Ni bezonas vian helpon por la komerca aranĝo. Laborlingvoj estos Esperanto, bulgara kaj angla. Por pliriĝigi la programon ni enmetos diversajn ekskursojn kaj promenadojn, vizitadon de diversaj instancoj, ktp. La aranĝo devus esti antaŭ Printempa Internacia Foiro en urbo Plovdiv kaj se ni malfruiĝus, post la Foiro. Vizitado de la PI-Foiro en Plovdiv estas necesa momento en nia agado.

Lasto Nikov, rete lasto11@yahoo.co.uk, UPIEK, Sofio - 1000, P.K. 497
+359 2 983 50 84, +359 899 8822 61, +359 888 0313 50

Novaj membroj

362. (dumviva) S-ro LIU Tieshann Wuyi-Lu, Xinfucheng Fuyuge 8 - 10, CN-410011 CHANGSHA, Hunan, Ĉinio, telefono kaj fakso +86-731-3657713

363. S-ro Chuck SMITH, Leiblstr. 31, DE-74081 Heilbronn, Germanio, chuck@eklaboru.com, www.eklaboru.com

364. S-ro LI Guoxuan, Zhanhou-Cun 16 -2 -1, Caijiagang, CN-232052 Huainan, Anhui, Ĉinio, °1956, telefono: +86-554-5674659, fakso: 5710110, reto: espliĝ@yahoo.com.cn

365. S-ro WANG Baoshan, Baogang Yejinzha Gongsu, CN-014010 Baotou, Nei Menggu, Ĉinio, °1962, telefono: +86-472-2290114, fakso: 2159218, reto: chenping@tomotech.com

366. S-ro Vjaĉeslav NASRETDINOV - Business Life KZ, S. Ĵandosov Str., 73, of.414, KZ-160000 ŜIMKENTO, Kazakstano, www.businesslifekz.narod.ru/eo/main.htm, abchessel@list.ru, abchessel@yahoo.com, abchessel@ok.kz

Forpasoj

Dum la lastaj monatoj de 2006 mortis la IKEF-membroj André MERTENS-GOOSSENS (Belgio, membro ekde 1997) kaj Frank HELFRICH (Germanio, membro ekde 1995).

Novaj (ret)adreso

218. S-ro Zoran ĆIRIĆ, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, Serbio

250. S-ro Silvio KNISS MATES silvio@davincibrasil.com.br

358. S-ro Cyrille HURSTEL cyrille.hurstel@free.fr

Jarkolekto de TAKE

Fine de 2006 aperis la 'Jarkolekto de TAKE 2006', ĉifoje finredaktita de Fabien VAN MOOK. Sur 101 paĝoj ĝi aperigas artikolojn pri diversaj facetoj de la konstrufako. (<http://take.esperanto.free.fr/>, fabien@galerio.org)

Malferma letero al landaj asocioj, lokaj kluboj kaj regionaj komisionoj**Grava tasko por plia rekono al nia movado**

Laŭ mia opinio unu el la gravaj taskoj de la landaj asocioj estas havi spefice bonajn rilatojn kun la naciaj komisionoj por Unesko kaj la landaj UN-asocioj, sed ankaŭ ĝenerale kun ministeriaj kaj publikaj instancoj.

Precipe pri la du menciitaj organizaĵoj mi havas kelkajn bonajn spertojn. Kiam mi kontaktis la ĝeneralan sekretariinon de la dana komisiono por Unesko post mia elekto kiel landa prezidanto, mi konstatis ke ŝi ne havas informojn pri nia movado, nek pri la rezolucioj de Montevideo kaj Sofia fare de Unesko. Mi tuj sendis al ŝi la menciitajn dokumentojn kaj ni sekve havis tre agrablan kunvenon. Ankaŭ ĉi-jare mi sendis la rezolucion de la UK en Florenco.

Samtempe mi kontaktis la prezidantinon de la dana UN-asocio, kaj por ŝi estis precipe interesa la rezolucio de la monda federacio de UN-asocioj.

La dana UN-asocio estas organizita simile al UEA: ĝi havas estraron kaj komitaton kun duspecaj reprezentantoj de la membroj: unu parto reprezentas la individuajn membrojn, kaj alia parto estas la reprezentantojn de la membraj organizaĵoj, precipe NRO-organizaĵoj, sed ankaŭ kelkaj politikaj organizaĵoj. La ĝenerala kunveno de la UN-asocio okazas nur ĉiun duan jaron, kaj ĉi-jare ĝi okazis la 11-an kaj 12-an de novembro 2007. Mi partoprenis kiel reprezentanto de nia landa asocio DEA kaj estis elektita kiel membro de la komitato. Kial mi opinias ke tio gravas? Simple ĉar se ni volas atingi rekonon ĉe UN kaj Unesko kaj ĉe aliaj instancoj ni devas esti videblaj kaj devas ankaŭ partopreni en la laboro de tiuj organizaĵoj je landa nivelo. Ĉio grava en UN aŭ en Unesko okazas nur pro proponoj de la landaj reprezentantoj. Pro tio estas esence grave, ke niaj landaj asocioj havas aliron kaj bonajn rilatojn al la naciaj Unesko-komisionoj kaj UN-asocioj.

Nia dana UN-Asocio estas tre bone organizita kaj sendas ofte informojn pri gravaj eventoj, kiel ekzemple pri la nacia socia forumo, kie ni ankaŭ sukcese partoprenis emfazante la lingvan diversecon kaj la lingvajn rajtojn, kaj ni jam komencis prepari nin por la dana socia forumo en 2007.

Ileana Schrøder
Prezidanto de la Dana Esperanto-Asocio
Zorganto por UEA pri UN-Unesko-aferoj je landa nivelo

[en la papera versio ĉi tie aperas spezokonto kaj bilanco]

[en la papera versio ĉi tie aperas spezokonto kaj bilanco]

Komercaj petoj kaj proponoj

Internacie: www.eklaboru.com

Eklaboru.com estas nova retpaĝo kie oni povas afiŝi sian vivresumon aŭ postenon. Oni rajtas afiŝi kaj pagatajn kaj nepagatajn postenojn (ekz. reta programisto, oficisto de Esperanto-centro, vartisto, instruisto, tradukisto, ktp).

Ĉinio

Bonvolu viziti nian retejon: www.energyresources.cn. Se vi havas ideon koncernan al nia komerco, kontaktu al ĉina peranto de IKEF. Mi estas direktoro de temoek-spluato en la kompanio Shaanxi Energy Metals and Minerals International Trade Co., Ltd.

Kolombio

Rikardo Karrillo (Ricardo Carrillo), rcarrilloc@yahoo.com, 35-jara studento pri medicino, volas eksporti ekzotikajn fruktojn el Kolombio (ekzemple uĉuva, angle *cape gooseberry*, kaj borojo, latine *Borojoa patinoi*, kaj aliaj fruktoj) kaj mi volas importi elektronikajn erojn (konektilojn, dratojn). Bv. sciigi al mi la eblecojn komerci tiujn varojn.

Litovio

Ĉe lago Paezeriai, sub tegmento de somera garbejo (preskaŭ kiel en 1939-a jaro) ripozejo estas je dispono. Sufiĉas loko por kelkdek da homoj kaj aŭtomobiloj. Ĉarma fiŝkaptado. Pago dum tuta 2007-a jaro – nur por elektra energio. Eblas lui biciklon kaj aŭtomobilon kaj mendi manĝon. Direktu vin anticipe al Stasys Kruzinauskas; Roziu 45, Vilkaŭiŝkis, Litovio. stkruz@lrs.lt; tel. +370-699-04065.

Malagasio - importo de dentista aparataro, eksporto de manartaĵoj

Ĵus mi finpretigis mian retpaĝon pri la eksportado de malagasaj manartaĵoj. La adreso estas: www.esperanto-eksporto.com (v. je la lasta paĝo de ĉi tiu revuo). Atendante, mi petas vian helpon pri alia eventuala ebleco mia. Mi deziras kontakti komerciston (se eblas esperantiston !) pri dentista aparataro kaj aliaj dentistaĵoj. HENRIEL Fidilalao, retadreso; fidilalao@yahoo.fr

Malio - Gvineo

Mi mem estas maliano nekomercisto, sed mi havas amikon en Gvineo (Konakrio), kiu estas komercisto de multaj varoj. Li interesiĝas pri kelkaj varoj el :

- Ĉinio: plastikaj pakadoj, piloj, produktoj kontraŭ fiherboj, rizo
- Hindio: piloj, produktoj kontraŭ fiherboj
- Vjetnamio: rozo, produktoj kontraŭ fiherboj

GRAVE : Li ne estas esperantisto, do mi petas ke vi sendu angle la informoj al mi. Se eblas, sendu viajn TTTejojn. Drissa Flayoro ([drissa_flayoro\(a\)yahoo.com](mailto:drissa_flayoro@yahoo.com)), Bamako, Malio, Afriko

Pakistano

Ĉi jare ekspozicio por eksterlandanoj okazos en la lasta semajo de marto 2007. Se iu IKEF-komercisto volas partopreni en tio, li povas peti al nia ŝtata oficejo 'Trade Development Authority of Pakistan' (TDAP) kiu certe aranĝos liajn loĝadon kaj manĝadon se li havas bonan kompanion. Por kontakto: Altaf Gohar ([al_gohar\(a\)hotmail.com](mailto:al_gohar@hotmail.com)), tel: 0092-51-2273243, fakso: 0092-51-2209008, mobila: 0092-300-8506957 aŭ 0092-321-8506957

RusioLudkartoj

Interesitoj pri ludkartoj, kaj ankaŭ interesitoj pri kopiaĵoj de la antikvaj, dezirantoj havi iujn ajn siajn proprajn ludkartoj je 20 ekzempleroj bonvolu kontakti min: Sergej Krajuhin, pr. Koroljova 31-1-54, S.-Peterburgo -197349, Rusio, rete [skrayukhin\(a\)yandex.ru](mailto:skrayukhin@yandex.ru). PS: La reldono de la ludkartoj eble estonte ne plo estos, pro tio oni decidu rapide.

Rutnera forno - polipropileno

Nia organizo vendas Rutneran Forno (faritan en Aŭstrio), 1981 j., en bona labora stato. Bruliga kapacito - ne malpli ol 2500 MT/j. Oni povas uzi ĝin kiel utiligilon de uzina rubo (ceteraj elĵetaĵoj) por produkti vaporon por entreprena bezono. Kosto

estas kontrakta kaj favora. Se vi deziras ricevi pli detalan informon, skribu al [abchessel\(a\)yahoo.com](mailto:abchessel@yahoo.com) aŭ [blkz\(a\)bk.ru](mailto:blkz@bk.ru). Vjaĉeslav Nasretidinov

Nia agentejo ankaŭ estas oficiala peranto de polipropilena uzino en nia urbo, kiu proponas altkvalitajn varojn - sakojn kaj pakadojn de polipropileno ktp. Krome, ili proponas fari polipropilenaĵojn laŭ via mendo kun via logo. Ni serĉas aĉetantojn kaj bonvenigas ĉiujn vendistojn tutmonde al kunlaboro.

Senegalio

WOUJJI Kossi Super ([swoudji55\(a\)yahoo.fr](mailto:swoudji55@yahoo.fr)) estas komercisto en Dakar, la ĉefurbo de Senegalio. Li deziras ke vi sendu merkat-revuojn por ke li povu mendi varojn kiujn li deziras aŭ ekrilati kun multaj komercistoj en la mondo.

Tajlando

Sur sia paĝo www.mondetur.net/tajlando.htm MONDETUR detale informas pri siaj servoj.

Nova granda vortaro germana-esperanta

En aprilo 2007 aperos en Hamburgo, Germanio la plej granda dulingva Esperanto-vortaro. BUSKE-eldonejo aperigos Grandan Vortaron Germanan-Esperantan (1679 paĝoj). Por pliaj detaloj rete kontaktu www.buske.de resp. [info\(a\)buske.de](mailto:info@buske.de). Ĝis julio 2007 validos subskripcia prezo de 98 eŭroj (poste 128 eŭroj).

Prof. d-ro Erich-Dieter KRAUSE
Membro de Akademio de Esperanto, aŭtoro de la vortaro

Esperanto-parolantaj komercistoj

Je <http://webcenter.ru/~espmik/listo.htm> aperas listo de Esperanto-parolantaj komercistoj, prizorgata de ESPERANTO-SERVOCENTRO. Tamen, nun estas kelkaj problemoj, parte teknikaj, parte pro manko de helpantoj. Eventuale rigardu ankaŭ je www.comail.ru/~samiko/servocentro. Se la prizorganto ne trovos aldonajn fortojn, li devos nuligi ĉion.

Mikaleo Chertilov, [espmik\(a\)online.ru](mailto:espmik@online.ru)

Plua diskuto pri fervojfakaj terminoj, komerca negocado kaj transporta teknologio

Daŭrigo de artikolo el LM n-ro 92 (oktobro 2006)

Enkonduko

La sekvanta teksto estas grava por problemoj en komerca negocado (kaj por la Internacia konvencio pri la Fervoja Vartrafiko – mallongigite CIM). En Terminara Kuriero 125 – komunikilo de Terminara Sekcio de Internacia Fervojista Esperanto Federacio (IFEFF) aperis proponoj de fakterminoj por fervoja transporta teknologio kaj komerca negocado por diskuto en kadro de menciita Sekcio kiel parto de Faka komisiono de IFEFF. En leteroj kun Heinz Hoffmann, sekretario de Terminara Sekcio kaj redaktoro de TeKu, kun necesaj aldonoj, la aŭtoro en ĉi-tiu daŭriga artikolo klarigas la sencon de diferencigo de unuopaj koncernaj terminoj. Por la legantoj (precipe komercistoj) de „La Merkato“ estos interese pro ilia negocado kaj alia praktiko en komunikado kun trafikistoj, speciale fervoja transporto.

Diskuto pri koncernaj terminoj

08376 haltodaŭro de trajno (nuna E-termino)
stationnement (matériel roulant) (franca)

terminproponoj: 1) kargadmalfriiĝo kaj 2) vagonrestado pro kargadmalfriiĝo

Fervoja Terminaro (sub plena titolo UIC Railway Dictionary Fervoja Terminaro Esperanto-Français – Français-Esperanto, MÁV, Budapest, 1997) estas bazo por esperantaj terminoj. En faka fervoja vortaro kun terminologio de Internacia Fervoja Unio („UIC Railway Dictionary Hungarian – English – German – French“, eldono de MÁV, Budapest, 1997) estas terminoj gravaj por nia diskuto.

haltodaŭro de trajno – stationnement (matériel roulant) /m/ - stabling of train;
stabling – Stillstand /m/ PR20
takso vagonrestada - stationnement /m/ (tarifs) – wagon demmurage charges;
wagon detention charges – Wagenstandsgeld /n/ MA10
haltodaŭro - durée d'arrêt /f/; temps d'arrêt - length of stop – Aufenthaltsdauer /f/ PR50

restadkosto vagontaga – wagonjour /m/ wagon-day – Wagentag /m/ VS20
takso vagonrestada - taxe de stationnement /f/ (d'un wagon) – wagon demmurage charge – Wagenstandsgeld /n/; Standsgeld /n/ MA30
takso vagonrestada - droit de stationnement /m/ (tarifs); frais de stationnement /pl/ – wagon demmurage charge; wagon detention charges - Wagenstandsgeld /n/; Standsgeld /n/ MA10

Estas evidente ke kelkfoje du samsignifaj terminoj en unu lingvo (ekzemple franca) aperas kiel diversaj terminoj aŭ kiel sinominoj (en angla kaj germana). Tio estas evitenda en ĉiu lingvo, precipe en Esperanto.

Laŭ logika pensado la nuna termino „haltodaŭro de trajno“ povas rilati al pasaĝeraj kaj varaj trajnoj. La plej bona pruvo estas signo PR20 (Trajntrafiko) kiu estas neŭtrala al speco de trajnoj kaj trafikoj. Ankaŭ ekzistas termino „haltodaŭro“ sub numero 02957 kaj signo PR 50 (Horara servo), franclingve „durée d'arrêt“ aŭ „temps d'arrêt“ (ankaŭ neŭtrala...) Ĉi-tio estas regula ordinara haltodaŭro laŭ horaro. Pro kio en difino en TeKu oni insistas por kargadmalfriiĝo se respektiva termino estas ĝenerala kazo de haltigo de trajno. En vortaro „Fervoja Terminaro“ Esperanta – serbokroata Serbokroata – Esperanta (redaktis: Josip Zupanić kaj Ljudevit Sekereš, Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj, Beograd, 1971), ekzistas „haltodaŭro“ kiel „stajanje“, „zadr avanje“ kaj „bavljenje“. Se ekzistas problemoj de „kargado“ (france “chargement”) kiu estas termino el Fervoja Terminaro sub VS30 (Aranĝo de transporto, kargadorganizado) oni devas enkonduki nova(j)n termino(j)n. En kazo de restado de varvagonoj pli longe ol „kargadlimtempo“ (ankaŭ ekzistas en Fervoja Terminaro – france “délai de chargement” sub VS30), t.e. “délai de déchargement” (malkargadlimtempo) terminoj sub proponoj 1) kaj 2) estas taŭgaj – ĉiu siamaniere en kunteksto. Ĉi-tio estas eksterordinara haltodaŭro pro (kargad)malfriiĝo bezonante adekvatan diferencigon en terminoj.

Terminoj sub numeroj 02967 „restadtempo (varvagono)“ (franclingve kiel “durée de stationnement” sub PR50) kaj 08376 „haltodaŭro de trajno“ estas necesaj pro diferencigo en ĝenerala senco de haltodaŭro de pasaĝeraj kaj vartrajnoj unuflanke, kaj aliflanke restado de varvagonoj pro tarda livero de varo flanke de liverantoj, malfriiĝo okaze de enŝarĝo kaj elŝarĝo ktp. Terminoj „haltodaŭro de trajno“ rilatas al regula trajntrafiko laŭ horaro (ekskluzive de malfriiĝo) kaj eventuale inkluzive ebleco de malfriiĝo. Terminoj „restadtempo“ (varvagono) rilatas al varvagonoj

(kiuj povas esti en kaj ankaŭ ekster trajnoj en havenoj, stacidomoj ktp en tielnomataj „varoperacioj“ – el-/enŝarĝo ktp). Estas evidente ke ĉi-tiuj terminoj havas siajn apartajn signifojn kaj oni povas respekti ĉi-tiun fakton. Sed ekzistas terminoj sub 07938 „restado (varvagono)“ sub signo PR50 (Horara servo) kaj 07493 „restaĵo (varoj, vagonoj)“ kaj sub VS30 (Aranĝo de transporto, kargadorganizado). Tiuj ŝajnas kiel sinonimoj (diferenco tamen estas en nocio „tempo“), sed diferencoj tamen ekzistas. Sen interveno de kompetenta nivelo de UIC en oficialaj lingvoj (angla, germana, franca) IFEF-Faka Komisiono (Terminara Sekcio) ne povas solvi individue problemon de signifo.

Termino sub 02944 samtempe ekzistas sub 08669 kiel „takso vagonrestada“ (speco de kompenso). UIC devas doni klarigojn. Eventuale poste estos eble konkludi pri ekzistado de sinonimoj aŭ necesaj diferencoj. Ambaŭ terminoj ekzistas en Fervoja Terminaro (eldono Budapeŝt 1997) du formoj kiel sekvas (kun diferenco en francaj terminoj kaj signoj):

takso vagonrestada MA10 (Trafiko, historio de entrepreno) – france droit de stationnement /m; frais de stationnement /pl/; stationnement /m/ (tarifs)

takso vagonrestada MA30 (Prilaboro de propono, tarifoj) – france taxe stationnement /f/ (d'un wagon).

Krom tio ankaŭ ekzistas termino sub 07253 „restadkosto vagontaga“ sub signo VS20 (Aranĝo de vendo, postvenda servo) – franclingve journée-wagon /f/; wagon-jour /m/.

Fina komento

Rimarkoj al problemo de diferencigo de terminoj helpas en fina decido ne nur en traktado pri terminoj „restadtempo de vagono“, sed ankaŭ en aliaj koncernaj terminoj en pluaj traktadoj. Rezulto de diskuto estas en restado de proponata termino en ĝisnunaj signifo, respektive rezignado de ŝanĝo. Sed kontribuo de diskuto estas en ĝia klarigado en apliko. Tamen ekzistas bezonoj por ŝanĝoj, sed en aliaj kazoj. En Fervoja Terminaro ekzistas terminoj sen sufiĉaj elementoj. En iuj kazoj por pliprecizigo oni metis parentezoj kun aldonaj vortoj. Estas necesaj precizaj difinoj flanke de UIC. Ĉiu termino estas bona kaj necesa en celo por klarigi eblan signifon, inkludante bezonataj detaloj kaj diferencoj inter terminoj.

D-ro Zlatko Hinšt ([zlatko.hinst\(a\)hznet.hr](mailto:zlatko.hinst(a)hznet.hr))

[en la papera versio: www.esperanto-eksporto.com]